N.21

# LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO



SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

(fondita en 1918)

CENTRA KOMITATO

Prezidanto: DOUGLAS MURPHY, 7, Constable Road, Ipswich, Anglujo

Sekretario: J.K. HAMMER, Taxusstraat 7, Zaandam, Nederlando

Kasisto: DAVID H. WITHEY, 21, Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool 22, Anglujo

Ĉefredaktoro: PASTRO H.A. ROSBACH, Folldal, Norvegujo

Geskoltoj!

Pasis jam la limdato, jes, eĉ plua semajno kun la pentekosto kaj kun nia norvega festotago, la 17an de majo. Kiom mi dezirus ke ĉiulandaj skoltoj povus ĉeesti tiun tagon, kiu estas ia unikaĵo, kaj kies centro fakte estas la infano.

Je la oka matene mi staris kune kun la geskoltoj de Folldal ĉe la flagstango de la lernejo. Samtempe staris, en la tuta lando, aliaj skoltoj en aliaj lokoj, kaj precize je la oka du skoltoj (i.a. mia dua filo) iris al la stango kaj ekhisis la flagon dum la geskoltoj salutis la flagon kaj kantis. Poste mia tria filo mallevis la flagon de la lupidoj, kaj du moluloj metis sian manon sur la nun horizontalan flagstangon, kaj mi - ĉar la Akela ne povis - akceptis ilian lupidopromeson. Unu el tiuj estis mia kvara filo. Kaj vere strange estas, ke nun estas la lasta fojo kiam mi ĉeestas tiun ceremonion kiel grupestro en Folldal.

Je la deka komencas la infana amasprosecio de Folldal centro al la preĝejo - 3 km. En la antaŭo iras geknaboj kun verdaj ĉapoj, estas la plenumantoj de la mezgrada lernejo, kiuj festas sian lernejofinon. Inter ili mia unua filo! Kaj poste venas geknaba orĥestro, kaj jen la infanoj, lerneja klaso post lerneja klaso, ĉiu infano kun sia flageto kiun ili vibrigas en la aero. La skoltoj kun siaj flagoj kaj standardoj kuniras, kaj en la preĝejo, dum la diservo, staras, en la ĥorejo apud la altaro kun la norvega flago.

Kaj ĉie en la lando same. Miloj da infanoj laŭdkrias al la lando, pro nia libereco. Preskaŭ ne estas vidata soldatoj - nur kie oni metas florkronon sur tombo de falintoj ili vice troviĝas, alie nur unuope. Militistaj paradoj ne ekzistas. Sed ĉie vi povas vidi skoltojn aŭ skoltinojn.

Jes, tio estas grandioza tago. Kaj - kio okazus, se en ĉiuj landoj la militistoj malaperus el la bildo, dum gajaj infanoj salutus la flagojn kaj la landon, kaj la skoltaj estus la solaj uniformoj videblaj?

Mia lasta ĉi tie. Antaŭ ol tiu numero atingos vin, mia nova adreso estas:

Paroĥestro Hans Amund Rosbach, Nergata 37c, Kristiansund N.

Mi ne scias, ĉu mia kariero kiel skoltestro daŭros. Sed al la "Skolta Mondo" mi deziras esti fidela. Do, uzu tiun adreson, kaj sendu antaŭ la 10.an de aŭgusto.

Via


Hans Amund.




OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

Volumo III, n-ro 21. Dua jarkvarono 1967.


# arĝenta



# lupo

La arĝenta lupo estas la plej alta honorigo en la skolta movado. Ĝi do "pendas alte".
Estas tial granda ĝojo al ni gratuli nian prezidanton pro tiu alta honorigo. La brita ĉefskolto decidis aljuĝi ĝin al li pro "servoj de la plej escepta grado dum 38 jaroj en Suffolk".

La brita ĉefskolto certe ne aljuĝis ĝin pro la servoj en nia Skolta Esperantista Ligo. Sed li scias pri tiu laboro ankaŭ en S.E.L.
Kaj la arĝenta lupo estas ordinare donata pro servoj, kiuj havas ankaŭ internacian valoron.
Ni tial povas fidi, ke la ĉefskolto, Sir Charles Maclean, ne povis pretervidi tiun internacian laboron, kiun nia Douglas Murphy faris per nia ligo.
Kaj dum ni tial gratulas nian prezidanton kaj ĝojas pro lia honorigo, ni ankaŭ iom fieras mem - sentante ke tiu arĝenta lupo ankaŭ honorigas nin!




El Finnlando ni ricevis la

KANTON DE HAKKIS

La hakkis-tendaro (4-a ĵamboreo de la Finna Knabskolta Asocio) okazis en la jaro 1965 en Saŭvo, proksime al Turku kaj ĉe la maro.
Hakkis estas la simbolo de la tendaro kiu trovis ĝin ĉe la suoma nomo de la birdo "Corvus monedula" - en la finna "Hakkinen".
Sur la bildo la birdo portas la skoltĉapon, t.n. väinämöinen-ĉapon, blu-blankan kiel tiu de la heroo de Kalevala.

Alla marcia | Wahlshöm/Winter



1. Ni al Hakkis-strandoj
piede venas, aŭ sur mar'.
Eĉ el fremdaj landoj
venas nia ar'.
Ĉiujn vojojn interplektu,
aŭdu: logas vin natur',
vojon al la Saŭvo rektu
kien logas aventur'.

2. Ĉie pinoj altas,
sed ĉe tendo apud tend'
la okulo jam haltas,
pasis la silent'.
Ĉar nun indas la laboro,
ĉiu devas agi nun,
venos poste gaja horo
kaj al kant' la oportun'.

3. Festoj, agoj, konkursoj,
- kun la ĝojo la labor' -
kaj en belaj ekskursoj
ligas koron kor'.
Hakkis estas la simbolo
de la gaja skolta ar',
signo pri la bona volo
kaj pri amikeca far'.


4. Ho, la horoj rapidas,
baldaŭ regu nokttrankvil',
sed ĉe l' lago ni vidas
fajron, ĝia bril'
malrapide nun formortas
dum formiĝas frata rond',
tiel finsignalo portas
eĥojn ĉien tra la mond'.

Trad: Seppo Tella/Haro

# indianludo



## ASSINIBOIN




Al tiu indianludo vi bezonas lignostangeton ĉ $\frac{1}{2}$ cm dika kaj 75 cm longa. 75 cm longan ŝnuron vi ligas al ĝi kiel montras la bildo, kaj al la alia fino ringon el ligno, kaŭĉuko a.s. Tiu ringo havu internan diametron 6-7 cm. La ludo: Svingu la ringon antaŭen kaj supren, kaj kaptu ĝin per la stangeto.

## KO-NEN-NO-HI-WAG

Ĉi tiun ludon povas la tuta patrolo aŭ eĉ trupo ludi. La ludantoj kreas du partiojn, kaj ĉiu havas golejon al kiu ludi. Ĉiu ludanto havas bastoneton metron longa, kaj la "Pilko" estas duobla, kiel montras la bildo. Faru ĝin el paro da lanaj ŝtrumpetoj kun pilko en ĉiu, kaj kunligu ilin.
Komence la ludantoj formas cirklon. La duoblapilko estas ĵetata enaeren, oni do kaptu ĝin per la bastoneto kaj nur pere de ĝi ĵetu ĝin al la golejo - de ludanto al ludanto.
Ne tuŝu per piedoj aŭ manoj.

ESTU SINGARDAJ!

Ludanto kiu tuŝas alian per la bastono aŭ la pilkon per mano aŭ piedo, havu punĵeton. Unu el la alia partio tiam metu la pilkon sur sian bastonon kaj ĵetu al la golejo aŭ al kunludanto.



E.1 «Speideren»



<u>A V O T O</u> Ĉi tiu voknomo, vaste konata tra tutmonda Esperantujo, kaŝas la identecon de nia altestimata fondinto de S.E.L., Alexander Thomson, kiu naskiĝis en Londono la 15-an de Marto, 1896, fariĝis skolto en 1910 kaj Esperantisto en 1911. Dum la unua mondmilito Avoto, tiam eks-patrolestro, funkciis kiel flegisto kaj brankardisto en la Reĝa Armea Medicina Korpuso (angle: R.A.M.C.), kaj en la bataltranĉeoj li havis la ideon pri la "ĝemeliĝo" de la du de li amataj movadoj ...la skolta kaj la interlingva. Eldoninte en 1918 etan broŝuron, li baldaŭ ricevis energian kunlaboradon de John Leslie (nuna Sekretario de Brita Esperantista Asocio) kaj de sia frato Kenneth Graham Thomson, kiu fariĝis nia unua Sekretario. Post kelka tempo aliĝis Norman Booth, kaj en 1922 li transprenis la sekretarian oficon, kaj kun Douglas Davis kiel kasisto, laboris energie por SEL. Norman rakontas, ke en 1920 li vizitis Londonon kaj gastloĝis ĉe la familio Thomson: li dormis kun Ken., kaj Avoto tranoktis subtende en la ĝardeno. Post la armistico, Avoto fariĝis Trupestro kaj dum dek du jaroj li servis kiel komitatano de la Skolta Asekura Societo (Scouts' Friendly Society). En tiu rolo li ofte kontaktis B.-P. kaj diskutis kun li pri S.E.L., kaj fine persvadis lin oficiale rajtigi la portadon de la Verda Stelo sur la skolta uniformo.* Avoto ankaŭ partoprenis kiel reprezentanto de S.A.S. (S.F.S.) lian konferencon por kodigi la regulojn kaj principojn de la rovera branĉo de la skolta movado. En 1918 Avoto estis elektita Fratulo de la Brita Esperantista Asocio, kaj poste oni nomis lin Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio, pro lia elstara servo al la Esperanto-Movado. Li ĉeestis kelkajn Universalajn Kongresojn, kaj dum tiu en Varsovio en 1959 li pilgrimis al la tombo de Zamenhof kaj al lia naskurbo Bjalistoko, kie oni solene inaŭguris la bazon por eventuala monumento al la Majstro. Poste, li fariĝis membro de la internacia komitato por realigi la starigon de la memoraĵo. En la sama jaro Avoto elektiĝis al la Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj, kies unuaj rekomendoj estos prezentataj al la Kongreso en Tel Aviv en 1967. La subskribon "Avoto" bone konas miloj da samideanoj tra la tuta mondo, ĉar nia Fondinto estas aŭtoro de multaj artikoloj, tradukoj kaj poemoj, Plie, li verkis tiun tre utilan libreton

"Rimvortaro" (kies dua eldono estas nun prespreta kaj serĉas eldoniston) en kiu la Antaŭparolo havas la surprizigan adreson: "Brita Militzono, Francujo kaj Flandrujo, 1917". Ekster Esperantujo S-ro Thomson ne estas sen honorigo, ĉar li rajtas uzi post sia nomo la maloftajn literojn F.R.G.S., t.e. Fratulo de la Reĝa Geografia Societo, kaj li estas bone konata kiel eks-takskomizo statistikisto filatelisto kaj framasono. Li ankaŭ havas profundan intereson pri psikaj aferoj (jes, mi forgesis...li fondis en 1934 Psikan Esperanto-Ligon.)

Ankoraŭ tre aktiva, Avoto loĝas en Welling, Kent, Britujo, kie li estas i.a. UEA-Delegito) kaj havas vere ampleksan gekorespondantaron.....kaj privatan esperantan bibliotekon de ĉirkaŭ 700 volumoj! Sendube li rigardas kun plezuro, ke lia "bebo" nun alproksimiĝas al sia Ora Jubileo. Certe, tiu infano multe dankas al "paĉjo" pro sia naskiĝo kaj nun volas esprimi sian filecan amon al kara Avoto.

F.D.M.

(Vidu ankaŭ "Enciklopedio de Esperanto".)

* Ne plu permesata: sed oni rajtas surhavi emblemon "Esperanto Parolata".

= = = = = = = = = = = = = = = = =

Nova nacia reprezentanto.

En Kongo prenis sur sin tiun honortaskon Paul Deloin Nzemba-Paku. Nia nova reprezentanto naskiĝis la 13.11.1934, estas kristano (protestanto), kaj instruisto. Li skoltiĝis en 1965, kaj nun estas Nacia Komisaro en Federacio de Agrikulturaj skoltoj en Kongo. En 1965 li esperantistiĝis. Li havas familion: Edzinon kaj tri infanojn. Kaj jen ankaŭ bonvenon al nia granda familio!

Honorvorte mi promesas fari mian devon al Dio
Kaj patrolando.




Bramanismo:
Ĉi tio estas la sumo de la devoj:
Ne faru kontraŭ aliuloj tion, kio donus al vi ĉagrenon, se ĝi estus farata kontraŭ vi mem.

Mahabharatao 5. 1517.

Budaismo:
Ne ofendu aliulojn en maniero, kiu por vi mem estas ofenda.

Udanavargao 5.18





Konfuceanismo:
Ne faru al aliuloj tion, kion vi ne volas esti farata de aliuloj kontraŭ vi mem.

Interparoloj de Konfuceo 15.23

Taoismo:
Rigardu la profitojn de aliuloj kiel profito de vi mem, kaj lia malprofito kiel via propra malprofito.

T'ai-Ŝang Kan-jing P'ien.

Judismo:
Ne malamu vian fraton en via koro; admonu vian proksimulon, por ke vi ne portu sur vi pekon pro li. Ne faru venĝon kaj ne portu koleron kontraŭ la filoj de via popolo; amu vian proksimulon kiel vin mem: Mi estas la Eternulo.



Levidoj 19.17-18.





Kristanismo:
Vi aŭdis, ke estas dirite: Amu vian proksimulon kaj malamu vian malamikon; sed mi diras al vi: Amu viajn malamikojn, kaj preĝu por viaj persekutantoj, por ke vi estu filoj de via Patro.


Mateo 5.43-45.

# Jen: FLOSO!


el la nederlanda "De Verkenner"



## PROPRA GOLF-LUDEJO:



Somero alvenas, kaj kun ĝi tendaroj. Sed eĉ en tendaroj estas liberaj horoj - kaj jen brila ideo pasigi tiujn liberajn horojn agrable.

Jam je la komenco de la tendaro atentu, ke grundo al golfejo sufiĉu. Ĝi devas

1. havi (ekz 9) truojn al kiuj oni frapu pilketon. Ladskatolo en la tero estas bona truo.

2. numerigu la truojn. Apud ĉiu truo estas la forirpunkto de sekvanta truo.

3. La tuto estu tiel malfacila (kaj tiel facila) ke la patrolo povu fini la serion per ekz. po 25 frapoj.

4. Ĉiu skolto faru mem sian frapilon.

Dum la lasta tago de la tendaro estu granda konkurso. Unu patrolo (seso) invitas alian al sia ludejo. Ili kunkalkulas la necesajn frapojn de la patrolo.

Dua ludanto komencas, kiam la unua pasas la kvaran truon. La du plej bonaj patroloj (sesoj) ludos sur iu golfejo pri la fina venko. La venkanto ricevu trofeon!

(Laŭ "De Verkenner")

Rimarko.

En multaj turistaj lokoj nuntempe estas etgolfejoj. Eble skoltgrupo povus gajni monon per tiu ĉi ideo??

## Dankon!

S.E.L. ricevis jenajn donacojn:
Al la Kapitala Konto:
C. Bardsley £1, J. Graham £10, Griza Vulpo £14.
Al la "Paul Blaize-Konto"
J. Graham £15, Griza Vulpo £10.

La rentumoj de nia kapitalo nun komencas esti nia plej granda enspezo, kaj tial tiaj donacoj estas valoregaj - jes, eĉ necesaj - al nia movado. Laboro estas necesa por progreso - sed ĉiu laboro, ĉiu entrepreno, ĉiu ideo plenumata kostas monon.



Ni iras hejmen. Ĉi tie eĉ ne estas TV.

---




## Organiza Krizo.

"Arvikolo" en "Esperanta Finnlando" priparolas la organizan krizon, atentigas, ke "niaj organizaĵoj ne vivas....Ni faru malgrandan komparon: la skolta movado estas pli juna ol tiu de la esperantismo, ne multe, sed ĉiuokaze iom. La diferenco en la aĝo ne estas grava, sed la diferenco en la disvastiĝo kaj konateco estas vere tre videbla. Kial?"

Arvikolo trovas la kaŭzon: "ĉiu skolta agado baziĝas sur patroloj, sed oni ne lasas la patrolojn solaj, forgesitaj, ilin ĉiam subtenas la loka pli granda societo, kiun oni nomas flagrondo."

Jen ni - kiuj havas, kombinas, ambaŭ ideojn.
Kial ni ne pli progresas?



## PROPRA GOLF-LUDEJO:

Somero alvenas, kaj kun ĝi tendaroj. Sed eĉ en tendaroj estas liberaj horoj - kaj jen brila ideo pasigi tiujn liberajn horojn agrable.

Jam je la komenco de la tendaro atentu, ke grundo al golfejo sufiĉu. Ĝi devas

1. havi (ekz 9) truojn al kiuj oni frapu pilketon. Ladskatolo en la tero estas bona truo.

2. numerigu la truojn. Apud ĉiu truo estas la forirpunkto de sekvanta truo.

3. La tuto estu tiel malfacila (kaj tiel facila) ke la patrolo povu fini la serion per ekz. po 25 frapoj.

4. Ĉiu skolto faru mem sian frapilon.

Dum la lasta tago de la tendaro estu granda konkurso. Unu patrolo (seso) invitas alian al sia ludejo. Ili kunkalkulas la necesajn frapojn de la patrolo.

Dua ludanto komencas, kiam la unua pasas la kvaran truon. La du plej bonaj patroloj (sesoj) ludos sur iu golfejo pri la fina venko. La venkanto ricevu trofeon!

(Laŭ "De Verkenner")

Rimarko.

En multaj turistaj lokoj nuntempe estas etgolfejoj. Eble skoltgrupo povus gajni monon per tiu ĉi ideo??

## Dankon!

S.E.L. ricevis jenajn donacojn:
Al la Kapitala Konto:
C. Bardsley £1, J. Graham £10,
Griza Vulpo £14.
Al la "Paul Blaize-Konto"
J. Graham £15, Griza Vulpo £10.




La rentumoj de nia kapitalo nun komencas esti nia plej granda enspezo, kaj tial tiaj donacoj estas valoregaj - jes, eĉ necesaj - al nia movado. Laboro estas necesa por progreso - sed ĉiu laboro, ĉiu entrepreno, ĉiu ideo plenumata kostas monon.

---



## Organiza Krizo.

"Arvikolo" en "Esperanta Finnlando" priparolas la organizan krizon, atentigas, ke "niaj organizaĵoj ne vivas....Ni faru malgrandan komparon: la skolta movado estas pli juna ol tiu de la esperantismo, ne multe, sed ĉiuokaze iom. La diferenco en la aĝo ne estas grava, sed la diferenco en la disvastiĝo kaj konateco estas vere tre videbla. Kial?"

Arvikolo trovas la kaŭzon: "ĉiu skolta agado baziĝas sur patroloj, sed oni ne lasas la patrolojn solaj, forgesitaj, ilin ĉiam subtenas la loka pli granda societo, kiun oni nomas flagrondo."


Jen ni - kiuj havas, kombinas, ambaŭ ideojn.
Kial ni ne pli progresas?

El Kongo

ni ricevis leteron - aŭ pli ĝuste

... --- ...

Estas la "Bonsamariana Klubo por Malfeliĉaj Homoj" kiu skribas. Kaj ni "tondas" el ilia letero:



"Tenu la pacienton varma kaj seka." El The Scouter.

"Eksendependa nia lando konis plurajn mizerojn: tribaj militoj penetris, malamikoj de lando perfortis kaj buĉado regis... ĝis la homoj vivas en la arbaroj, sen nutro, sen vestoj, sen medikamento; dum la tago kaj la nokto ili mortadas, la orfoj ploradas..."

"La klubo demandas vin: Kiel vesti ilin? Kiel nutri ilin?..."

"Tuj ni alvokas la mondesperantistojn, al ĉiuj bonvolaj, al ĉiuj kompatemaj animoj, al ĉiuj kiujn gvidas kristana ideo.....Montru nin, ke la mondesperantistoj helpas la internaciajn malfeliĉajn homojn.."

"Ĉiuj kiuj volas helpi finance...jen la adreso: UNITED OVERSEAS BANK S.A., 3-5 rue du Conseil General, Geneve, Svisujo, konto 2307 (ACCI). "Indiku celon de pago kaj informu al la Estraro en Kongo. Materiala helpo: Nia nova N.R. en Kongo estas peranto. Ankaŭ neuzitaj poŝtmarkoj, unuatagaj kovertoj, libroj k.tp. povas esti donace sendataj por vendo.

El Ĉeĥoslovakujo

ni ricevis alian peton. La Popola Astronomia Observatorio (Ludova hvezdareň mesta Žiliny, Ĉeĥoslovakujo, estas la adreso) de Zilina kolektas infandesegnaĵojn je la temo "La kosmo kaj infano" kaj preparas internacian ekspozicion. Infanodesegnaĵoj kun suno, luno, planedoj, artefaritaj satelitoj ktp estas bonvenaj ĝis la 30-a de julio. La elektotaj desegnaĵoj estas honorataj per diplomo. Signu per nomo, aĝo kaj preciza adreso, prefere per skribmaŝino.

## H E L P E M U L O

Estas hom' helpanta grandanime,
man-etendas eĉ de malproksime.
Al-hom' en mizero li tuj venas,
kaj la dankesprimoj lin eĉ ĝenas.
Pro l' modestec' kaŝas li la nomon,
kaj mi plej estimas tian homon! (1963)

Armand Su

= = = = = = = = = =

Saluto el Nov-Zelando

12 membroj de Whangarei Aer-skoltoj nun lernas Esperanton kaj antaŭvidas la 33-an landan kongreson en nia urbo januare 1968.


En januaro 1967 ni tendumis ĉe la aermilitista bazo "Hobsonville" apud Auckland. Estis tre interesa, ĉar ni povis viziti instalaĵojn en la kontrolejoj, vidi Radar-sistemon, inspekti diversajn aviadilojn kaj helikopterojn. Ni ankaŭ vizitis transportmuzeon kun modeloj de antikvaj aviadiloj. En la flughaveno Mangese ni eĉ ricevis fluginstruon.

Komence de marto vizitis nin Sir Charles Maclean, la ĉefskolto de la brita "Commonwealth". (El letero de D.P.)

S.E.L.-kunveno dum la 52-a U.K.

Nia kunveno estos je vendredo la 4a de aŭgusto, kaj komenciĝos je la 9-a matene.
Prezidos la kunvenon la honora prezidanto de S.E.L., Norman Booth.
Ni esperas, ke multaj el niaj amikoj ĉeestos, kontribuos al la progreso de nia Ligo dum la interparolado, kaj ĝuos la internacian fratecon de skoltado.

Sekr.



NI RICEVIS

Muzilo. Bulteno de la esperanta muzikasocio, n-roj 1 - 10, kune binditaj.

Muzilo estas - krom la nomo de la bulteno - ankaŭ nomo de nova muzikskribo, bazita sur la klavaro de pianoforto, tiel ke novulo tuj povu vidi, kien metu la fingrojn. La 10 numeroj ankaŭ enhavas sufiĉe abundan kaj varian muzikon, skribitan per tiu nova skribo, de esperantokantoj kiaj "Preĝo sub la verda standardo" al klasika muziko de Schubert, Beethoven, Smetana kaj la kristnaskaj kantoj kaj modernaj dancoj.

Informa bulteno de II-a Stelo-kongreso, III-a internacia Esperanto-seminaro en Torun.

Tiu kongreso bedaŭrinde jam pasis, sed ne estis eble al ni pli frue mencii ĝin - ĉar ni nur aperas kvarfoje en la jaro. La temoj de la kongresoj estas tre interesaj - sed ankaŭ iom danĝeraj, kiel ekzemple la temo: "Landlimo ĉe Odra kaj Nysa - limo de Paco". Tiajn politikajn temojn nepolitika asocio kia Stelo devus eviti.

IOE-gazeto. Organo de Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto.

Interesa, multenhava gazeto kun multaj instigoj pri kiel ataki la problemon oficiala aprobo de la internacia lingvo. Ĉefe ĝi pledas la uzon en la ĉiutagaj medioj. Do ankaŭ kion ni provas fari en la skoltismo. Aldone estas desegnita kurso per facile kompreneblaj ĉiutagaj frazoj.

Goodwill Message of the Youth of Wales. Wales.

La tago de bonvolo estas la 18-a de majo, kaj denove ni bedaŭras la tro malfruan sciigon - pro la fakto, ke la kajero aperis post eldono de la unua numero. La "Bonvol-mesago", kiel nomas ĝin la kajero, ankaŭ troviĝas en Esperanto. Ĝi i.a. diras, ke la katastrofo en Aberfan instruis al ili eĉ plian komprenemon kaj simpation al ĉiuj, kiuj suferas.

Kio estas agado $E_3$? Multobligita letero de J.A. Tuinder, Ter Apel, Nederlando. Ĝirkonto 10 20 100.

Per la letero s-ro Tuinder apelacias al la esperantistaro helpi

per mondonacoj al la agado kiun iniciatis la katolikaj esperantistoj. La celo estas helpi al okulmalsanaj en Afriko. D-ro Zamenhof, okulkuracisto, helpis senpage al nepagipovaj. Nun ni sekvu lian ekzemplon. Kaj 10 "steloj" (ned.guld.2.50) kaŭzas miraklon!

Oslo, la ĉefurbo de Nòrvegujo.

La turisttrafika asocio de Oslo kaj ĉirkaŭaĵo eldonis verde/nigran tursitbroŝureton pri Oslo kun informoj pri la urbo kaj la ĉirkaŭaĵo. Tri bildoj beligas la broŝuron, kiun vi povas ricevi ĉe "Reisetrafikkforeningen, Oslo, Norvegujo".

La Delto-plano. Informa broŝuro de la Ministerio de Trafiko kaj Akvoŝtato, Nederlando.

Bela broŝuro, 16-paĝa, kiu per bildoj kaj landkartoj komprenigas la gigantan planon kiun plenumas Nederlando por protekti la landon kontraŭ la maro kaj gajni novan teron. Ni eble poste revenos al tiu projekto per artikoleto. La temo estas sufiĉe interesa.

Danio en Bildoj. Eldonita de la dana ministerio pri eksterlandaj aferoj.

Du grandaj folioj, unu kun 59 buntaj bildoj el la tuta Danujo, alia kun nigra preso kaj klarigoj pri la bildoj. Instrua, bela por la patroleja muro. Kaj: Senpage ricevebla ĉe la dana ambasadorejo de via lando. Petu ĝin!


Informa Bulteno de Internacia Turisma Kunveno de Esperanto-junularo.

Tiu kunveno okazos en Bygoszcz, Pollando, la 20-28 de aŭgusto 1967. Ampleksa kaj interesa programo estos plenumata dum tiu semajno, kaj partoprenantoj certe ĝuos la restadon. Aliĝon sendu al "Juventur", Warszawa 61, Aleja Róz 2. La turisma kunveno kostas 33 US-dolarojn, Internacia Ekskurso de Amikeco 59 US-dolarojn.

Geonkloj Esperantistaj.

Krom la "gazeton" ni ankaŭ ricevis leteron, en kiu ni estas insiste petataj helpi: Kiu volas esti onklo aŭ onklino por korespondi kun geknaboj en Pollando kaj Hungarujo? La devo estas korespondi, amikiĝi kaj teni la intereson pri Esperanto. Vin anoncu al J.H. Sullivan, 3 Berwick Avenue, Urmston, (Manchester) Anglujo.

Kolora broŝuro kun esperanta teksto. Kostas 3 ŝilingojn. Mendu ĉe NZEA, Box 40181, Upper Hutt, New Zealand.



# S K O L T A  E S P E R A N T I S T A  L I G O

(fondita en 1918)

Fondinto: "Avoto". Kunfondinto: J.W. Leslie.

Honoraj Prezidantoj: "Avoto", Norman Booth, Kolonelo D.H. Davis, L.J. Van Gulck.

## KONTINENTA KOMISIULO

AMERIKO: S-ro C.S. Otto, 7, Longview Road, Livingston, New Jersey, USONO.

## NACIAJ REPREZENTANTOJ

AŬSTRALIO: S-ro S.H. Milligan, 274, Mont Albert Road, Surrey Hills, E.10, Victoria.

BELGUJO: - Vakas -

BRAZILO: S-ro Euclides C. Soares, Av. Almirante Tamandaré 979, Belém, Pará.

BRITUJO: S-ro C. Bardsley, 42, Westbourne Street, Oldham, Lancs.

DANLANDO: S-ro Sejer Holgersen, Einarsvej 99, Lyngby, Kopenhago.

FINNLANDO: S-ro Seppo Tella, Pieni Roobertink, 4-6M70, HELSINKI 13.

HISPANUJO: S-ro Pedro Marqueta, Avenida de Valencia 32, Zaragoza.

ITALUJO: S-ro Pietro Ferrara, Via Brione 10, Torino.

JAPANUJO: S-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K., 16, Suekirotyo Kitatu, Osaka.

KANADO: S-ro John H.F. Hoyle, Box 421, Forest, Ont.
Helpa N.R. S-ro U, Paul Ronald, 45, 10th Ave., Roxboro', Quebec.

KONGO: S-ro Paul Deloin Nzemba-Paku, Kalembelembe no 225, St. Jean, KINSHASA.

NEDERLANDO: S-ro J.K. Hammer, Wibautstraat 49, Zaandam.

NORVEGUJO: S-ro H.A. Rosbach, Nergata 37c, KRISTIANSUND, N.

PORTUGALUJO: S-ro J.P. de Melo, Rua Jacinto Nunes 17-3º Dtº, Lisboa I.

SVEDUJO: S-ro Curt Bohman, Fack 7, Högen.

USONO: S-ro Larry A. Greene, 1115, Sewanee Drive, Chattanooga, Tenn., 37412.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL